TORPEDO-7

en

Herzberg am Harz 30.09-04.10.2011

INTERNACIA SIMPOZIO
Esperantaj eduk- kaj kulturcentroj, muzeoj, bibliotekoj
PROJEKTO PUNTO

Interkultura Centro Herzberg/Germana Esperanto-Centro, Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI. germana sekcio de ILEI) kun subteno de ESF organizos la 7-an Tradician Renkonton Pedagogian kun du ĉeftemoj:

1. **Simpozio** pri Esperanto-Centroj, muzeoj, bibliotekoj, arkivoj, kulturaj institucioj interesataj helpi unu la aliajn per kunlaboro, interŝanĝo de spertoj, materialoj

Nia celo estas:

- -inviti Esperanto-instruistojn, movadajn aktivulojn, reprezentantojn de urboj, urbaj eduk- kaj kulturinstitucioj kun multflanka, altkvalita Esperanto-agado, fakulojn de muzeoj, bibliotekoj, arkivoj
- raporti pri agadoj, atingoj, diskuti pri problemoj kaj interŝanĝi spertojn
- montri la valorojn de niaj institucioj, kolektaĵoj, materialoj
- daŭrigi la serion de fakkonsultiĝoj organizitan de ICH en 2005 kaj 2006
- surbaze de la modela instru- kaj kulturagado de la ĝemelurboj Herzberg am Harz (DE) kaj Góra (PL) krei reton de partneruboj, komunumoj, edukcentroj, ks., kies ekzemplo, ekzemplodona agado en unu loko povas instigi la aliajn, alilandajn similajn instituciojn
- trovi strategion por regula, kunordigita, internacia kunlaboro
- stabiligi la funkciadon de la nova ILEI-centro
- serĉi ekstermovadaĵn, urbajn, naciajn kaj internaciajn subvencifontojn por konstantigi kaj disvastigi valorajn poresperantajn instru- kaj kulturagadojn
- krei komunan prezentejon, platformon, lanĉi projekton PUNTO (PartnerUrba Nodo-TeksaĵO)

Partoprenkotizo

ĝis 31.08 40 EUR || poste 45 EUR subvencio de ICH/ESF estas petebla
Anoncu vian prelegtemon, prezentadon, ideojn por trakti kaj petojn por konsideri.
Prelegantoj kaj kunlaborantoj ricevos rabaton.

Kontakto: Zsófia Kóródy (prezidanto de AGEI, estrarano de ILEI) zsofia.korody@esperanto.de
DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6. +49/5521-5983, http://esperanto-urbo.de

Esperantic Studies FOUNDATION

ICH Interkultura Centro Herzberg